

Jean de La Fontaine,  
Cikado kaj formiko  
*tradukita de Antoni Grabowski*

Kantis dum somer' sen fin'  
Cikadin'.  
Kiam frostata vento blovis  
Sen provizo ŝin ektrovis,  
Sen malgranda eĉ pecet'  
Da mušeto aŭ vermet';  
La malsato pelis ŝin  
Al najbara formikin'.  
Kaj ŝi petis kun insisto:  
"Donu grajnojn por ekzisto  
Ĝis la nova jar-sezon'.  
Mi vin pagos, laŭ ordon',  
En Aŭgust', pro best-honor',  
La procenton kun valor'."  
Ke ne pekas formikino  
Per pruntemo, estas vere;  
"Kion faris vi somere?"  
Diris ŝi al pruntulino.  
— "Tage, nokte al venantoj,  
Ne mallaŭdu — kantis mi."  
— "Kantis? — gaja jen meti'!  
Nun ekdancu post la kantoj!"

*Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de JEAN DE LA FONTAINE (\*1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 – †1921-07-04).*

Arg-549-1108 (2014-03-16 17:39:47)

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi tradukon en [http://www.babelmatrix.org/works/frLa\\_Fontaine,\\_Jean\\_de/La\\_cigale\\_et\\_la\\_fourmi/eo/5026-Cikado\\_kaj\\_formiko](http://www.babelmatrix.org/works/frLa_Fontaine,_Jean_de/La_cigale_et_la_fourmi/eo/5026-Cikado_kaj_formiko). Ĝi troviĝas ankaŭ en la retejo de la usona esperantisto Don Harlow <http://donh.best.vwh.net>. Pri la tradukinto vidu la vikipedion retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni\\_Grabowski](http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski). Vidu ankaŭ: [http://eo.wikisource.org/wiki/Cikado\\_kaj\\_formiko](http://eo.wikisource.org/wiki/Cikado_kaj_formiko).*

Jean de La Fontaine,  
Die Grille und die Ameise  
*tradukita de N. N. 23*

Die Grille musizierte  
Die ganze Sommerzeit –  
Und kam in Not und Leid,  
Als nun der Nord regierte.  
Sie hatte nicht ein Stückchen  
Von Würmchen oder Mückchen,  
Und Hunger klagend ging sie hin  
Zur Ameis, ihrer Nachbarin,  
Und bat sie voller Sorgen,  
Ihr etwas Korn zu borgen.  
»Mir bangt um meine Existenz,«  
So sprach sie; »kommt der neue Lenz,  
Dann zahl ich alles dir zurück  
Und füge noch ein gutes Stück  
Als Zinsen bei.« Die Ameis leihst  
Nicht gern; sie liebt die Sparsamkeit.  
Sie sagte zu der Borgerin:  
»Wie brachtest du den Sommer hin?«  
»Ich habe Tag und Nacht  
Mit Singen mich ergötzt.«  
»Du hast Musik gemacht?  
Wie hübsch! So tanze jetzt!«

*Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de JEAN DE LA FONTAINE (\*1621-07.08 – †1695-04.12) en la Germanan de N. N. 23.*

Arg-549-1107 (2010-07-11 12:50:25)

*Tiun ĉi germanigon mi, Manfred Retzlaff, trovis en <http://www.zeno.org/Literatur/M/La+ontaine,+Jean+de/Versfabeln/Fabeln/Die+Grille+und+diet+Ameise>.*